Theodor Körner,

Am-ebrio

tradukita de Manfred Retzlaff

Al vi, knabino, vibretante
Albatas nur la kor' en mi,
En am', fidele vin celante,
Mi strebas nur al vi.

Nur via nom' kun sankta sono
Ja pleniginta estas min;
En bril' de belo kaj de bono
Mi ĉiam vidas vin.

La am' el ĝermo delikata
Elkreskis kaj ne velkas ĝi,
En miaj sonĝoj, amegata
Knabino, vivas vi.

La kordojn batas mi, fluadas
Entuziasmo super min;
La kantoj, kiujn mi kantadas,
Tutsole nomas vin.

Mi sentas, se vi min rigardas
En paradizo kvazaŭ min.
Ĉielo mia tiam ardas
Ĉe via dolĉa sin'.[2]

Por ĝojo kaj pro am-doloro
Sopiro sola nur en mi,
Nur unu pens' en mia koro:
Aĥ, estu mi ĉe vi!

Traduko de la Germana poemo " Liebesrausch" de Theodor Körner en Esperanton de MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 1984-06-20.*

MR-155-1 / Arg-764-1535 (2013-01-06 22:56:18)

[2] aŭ:
Je vi amplene mi rigardas,
En paradiz' mi sentas min,
Ĉielo mia rave ardas
Ĉe via dolĉa sin'.